

La Atesto kaj Historio de Jozefo Smith

Jene estas "La Atesto kaj Historio de Jozefo Smith," per kiu, Dio restarigis la veran Evangelion de Jesuo Kristo al la tero en ĉi tiuj lastaj tagoj.

Mi naskiĝis en la jaro 1805 de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la 23-an de decembro en la urbeto Sharon, provinco Windsor, ŝtato Vermont. Mia patro, Jozefo Smith forlasis la ŝtaton transloĝigante al Palmira, provinco Ontario, ŝtato Novjorko, kiam mi estis proksimume dekjaraĝa. Kvar jarojn poste, li denove transloĝiĝis kun nia familio, ĉi-foje al Manchester en la sama provinco Ontario.

Post nia transloĝiĝo al Manchester, dum la daŭro de la dua jaro, estis en la loko, kie ni loĝis, nekutima ekscito pri religiaj aferoj. Ĝi komenciĝis per la metodistoj, sed baldaŭ ĝeneraliĝis inter ĉiuj sektoj de tiu regiono. Verdire, la tuta provinco ŝajnis trafita de tiu agitado kaj grandaj popolamasoj ekaliĝis al la diversaj religiaj grupoj. Tio kaŭzis grandan instigon kaj disigon inter la popolo. Iuj kriis, "Jen la vero!" kaj aliaj, "La vero estas ĉe ni!" Iuj disputis por la metodista kredo, kaj aliaj por la baptista.

Malgraŭ la granda amo, kion la konvertitoj de la diversaj kredoj esprimis je la horo de siaj konvertiĝoj, kaj spite al la granda zorgo manifestata de la koncernaj pastroj, kiuj tre ageme stimulis tian eksterordinaran religian disputadon, celante konvinki ĉiujn pri la sekto plej kara al ili, oni konstatis, ke la pretenda senpartieco de la klerikoj kaj de la konvertitoj estis pli ŝajna ol reala. Kaj pro tio, sekvis teruraj konfuzo kaj malamo inter la pastroj kaj konvertitoj de ĉiu sekto. Tial, la fratecaj ligiloj, se ĉi tiuj iam ajn ekzistis inter ili, disrompiĝis en batalojn de vortoj kaj koliziojn de opinioj.

En tiu tempo mi iĝis 15-jaraĝa. Oni membrigis la familion de mia patro al la presbiteriana kredo kaj kvar el miaj familianoj aliĝis al tiu eklezio, nome: mia patrino Lucy, miaj fratoj Hiram kaj Samual Harrison, kaj mia fratino Sofronia.

Dum tiu periodo de granda ekscitiĝo, mia menso estis kondukata al serioza meditado kaj al granda maltrankvilo; sed kvankam miaj sentoj estis profundaj kaj ofte korŝiraj, mi tamen tenis min for de ĉiuj religiaj grupoj. Sed me ĉeestis iliajn diversajn kunvenojn tiom ofte, kiom mi povis. Dum la tempo forfluadis, mi fariĝis iom favora al la metodista seko, kaj sentis deziron aliĝi al ĝi; sed tiom grandaj estis la konfuzoj kaj la kvereloj inter la diversaj sektoj, ke estis nebla al homo tiel juna kiel mi, kaj sensperta rilate al homoj kaj homaferoj, atingi definitivan konkludon pri kiu pravas kaj kiu ne.

Mia menso fojfoje forte maltrankviliĝis, tiom grandaj kaj senĉesaj estis la tumultoj inter la anoj de la diversaj religioj.

Meze de tiu milito de vortoj kaj disigo de opinioj, mi demandis min multfoje, Kion mi faru?

Kiu sekto pravas; aŭ male, ĉu ili ĉiuj estas falsaj? Se iu el ili ja estas la vera, kiu ĝi estas, kaj kiel mi povas ĝin ekkoni?

Dum mi suferis sub la pezo de la ekstremaj malfacilaĵoj, kaŭzitaj de la kvereloj inter tiuj religiaj grupoj, iun tagon mi legis en la Epistolo de Jakobo, unua ĉapitro, kvina verso la jenon: "Se al iu el vi mankas saĝeco, li petu Dion, kiu donacas al ĉiuj malavare kaj ne riproĉas, kaj ĝi estos al li donata!"

Neniam iu ajn verso de la Sankta Skribo penetris la koron de homo kun pri da forto ol tiu, tiumomente, la mian. Ĝi ŝajnis penetri per grandega forto en ĉiun fibron de mia koro. Multfoje mi pripensis ĝin, sciante, ke se iu bezonas saĝon de Dio, tiu persono esta mi. Mi ne sciis tamen, kiel agi kaj se mi ne povus havigi al mi pli da saĝeco al mi tiam havis, mi neniam sciis; ĉar la instruistoj de la diversaj religioj interpretadis la samajn tekstojn de la Sankta Skribo tiom malsame, ke ili detruis ĉiun esperon solvi la problemon per konsulto al la Biblio.

Finfine mi decidis ke mi devas aŭ resti en tenebro kaj konfuzo, aŭ sekvi la konsilon de Jakobo, tio estas, turni min petege al Dio. Fine mi decidis peti Dion konkludante, ke se Li donacas saĝecon senriproĉe kaj malavare al tiuj, al kiuj ĝi mankas, mi povus provi.

Do, laŭ mia decido peti Dion, mi iris al bosko por fari la provon. Tio okazis en la mateno de hela tago ĉe la komenco de la printempo de la jaro 1820. Estis la unua fojo en mi vivo kiam mi provis laŭpreĝi; ĉar dum tiu ĉi maltrankvila tempo mi ankoraŭ ne provis preĝi laŭvoĉe.

Post kiam mi iris al loko pri kiu mi antaŭe decidis, rigardante ĉirkaŭen kaj rimarkante, ke mi estas sola, mi surgenuiĝis kaj komencis esprimi miajn kordezirojn al Dio. Tuj stranga forto tute ekposedis min, kaj tiel forta ĝi estis, ke ĝi tute paralizis mian langon, ke mi eĉ ne kapablis paroli. Densa mallumo ĉirkaŭvolvis min kaj al mi ŝajnis, ke mi estas kondamnata al subita pere.

Sed, uzante, ĉiujn miajn fortojn por petegi Dion, ke Li liberigu min el la povo de ĉi tiu malamiko, kiu subigis min, en tiu sama momento, kiam mi estis falonta en malesperon kaj forlasonta min al neniigo - ne al iu imaga neniigo, sed al la povo de iu reala estaĵo de la nevidebla mondo, kiu posedas tian mirigan forton kian neniam antaŭe mi rimarkis en iu ajn estaĵo - ĝuste en tiu momento tiom minacanta, mi ekvidis lumkolonon ŝvebant super mia kapo, pli brila ol la suno. Tiu lumo malsupreniris iom post iom ĝis ĝi falis sur min.

Tuj kiam la lumo aperis, mi estis liberigita el al povo de la malamiko kiu senmovigis min. Kiam la lumkolono atingis min, mi ekvidis du homfigurojn, kies gloro defias iun ajn priskribon, starantaj en la aero super mi. Unu el ili min vokis per mia nomo kaj diris, fingromontrante al la alia: "Tiu ĉi estas Mia Amata Filo. Aŭdu Lin!"

Mia celo, kiam mi turnis min al la Sinjoro, estis eltrovi kiun el ĉiuj religiaj sektoj pravas, por ke mi sciu al kiu aliĝi.

Kiam mi reposedis mian parolpovon, mi demandis la du homfigurojn, kiuj staris super mi en la lumo, kiu sekto pravas, kaj al kiu mi devas aliĝi. Ili diris al mi, ke mi aliĝu al neniu el la ekzistantaj religioj, ĉar ĉiuj estas eraraj. Kaj la sama estaĵo kiu parolas al mi, diris, ke ĉiuj kredoj estas abomenindaj al Li, kaj ke iliaj instruistoj estas koruptaj, ke "Ili alproksimiĝas al Mi per siaj lipoj, sed iliaj koroj malproksimiĝas; ili instruas kiel doktrino la leĝojn de la homoj, kun speco de sankteco, sed ili neas la povon de Dio."

Denove Li malpermesis min aliĝi al iu ajn el la ekzistantaj sektoj, kaj parolis pri multe da aferoj, pri kiuj mi ne povas en ĉi tiu momento skribi. Kiam mi renormaliĝis, mi troviĝis kuŝanta, rigardante ĉielen.

Post kelkaj tagoj de kiam mi vidis ĉi tiun vizion, unu el la metodistaj predikantoj, kiu estis tre agema en la antaŭe menciita religia agitado min akompanis. Parolante kun li pri la temo de religio, mi rakontis mian vizion. Tre multe min surprizis lia konduto; li traktis mian rakonton ne nur frivole, sed kun granda malestimo, dirante, ke tio estis ago de la diablo, ke en niaj tempoj ne plu ekzistas vizioj aŭ revelacioj, ĉar tiaj aferoj ĉesis kun la apostoloj kaj neniam plu ekzistos.

Mi baldaŭ eltrovis, ke mia rakonto vekis grandan antaŭjuĝon kontraŭ mi inter la estroj de la religioj, kiuj ekde tiam persekutadis min. Tia persekutado pligrandiĝis, malgraŭ la fakto, ke mi estis humila, sensignifa 14-jaraĝulo. Kaj spite al tio, ke mia situacio en la vivo ne permesis esperi, ke mi estos iam, io krom malgrava junulo, influhavaj homoj ekmaltrankviliĝis kaj instigis la publikan opinion kontraŭ mi, kaj tiamaniere kreis kruelan persekutadon. Kaj tio fariĝis komuna celo inter ĉiuj sektoj - ĉiuj unuiĝis por persekuti min.

Mi estis nur iomete pli aĝa ol 14-jara, kondamnita akiri nesufiĉajn vivrimedojn per ĉiutage laboro. Sekve, mi serioze demandadis min tiam (kaj mi ofte ekde tiam min demandis): Kial mi estis konsiderata sufiĉe grava por altiri la atenton de la eminentuloj de la pli popularaj sektoj de tiu tempo kaj kaŭzi tiom da la plej amara persekutado kaj insultado? Sed strange aŭ ne, tiel estis, kaj tio ofte kaŭzis al mi grandan malĝojon.

Tamen, mi faktericevis vizion. Multefoje mi sentis min kiel Paŭlo kiam li sin defendis antaŭ la reĝo Agripo kaj rakontis pri la vizio, en kiu li vidis glorklaron kaj aŭdis voĉon. Sed estis nur malmultaj personoj, kiuj kredis lin; kelkaj diris, ke li estas malhonesta; aliaj, ke li frenezas; kaj li estis ridindigata kaj insultata. Sed tio ne detruis la realecon de lia vizio. Li ja vidis vizion, li sciis, ke li vidis ĝin kaj ĉia persekutado sub la ĉielo ne povus ŝanĝi tiun fakton. Eĉ se oni persekutadus lin ĝis la morto, li ĉiam sciis ĝis sia lasta elspiro, ke li vidis lumon kaj aŭdis voĉon parolanta al li, kaj la tuta mondo ne povis devigi lin pensi aŭ kredi alie.

La samo okazis al mi. Mi efektive vidis lumkolonon, kaj meze de tiu lumo, du homfigurojn, kaj ili vere parolis al mi; kaj kvankam oni persekutadis kaj min malamis pro tio, ke mi vidis vizion, tamen, tiel ja estis; kaj dum oni persekutadis kaj insultadis min per ĉiaj kalumnioj pro miaj asertoj, mi ekmeditis en mia koro; Kial oni persekutas min pro tio, ke mi diris la veron?

Mi efektive vidis vizion, kaj kiu estas mi por kontraŭstari Dion? Aŭ kial la mondo penas devigi min nei tion, kion mi vere vidis? Mi ja vidis vizion kaj mi sciis tion, kaj mi sciis, ke Dio scias tion, kaj pro tio, mi nek povis ĝin nei, nek kuraĝis tion fari. Aliflanke, mi sciis, ke se mi farus tion, mi ofendus Dion kaj estus kondamnita de Li.

Mia menso nun kontentiĝis pri la sekteca mondo - mi komprenis, ke ne estas mia devo aliĝi al iu ajn el la sektoj, sed daŭri kiel ĝis tiam, sendependa, ĝis nova orientiĝo. Mi malkovris, ke tute pravas la atesto de Jakobo, "Se al iu el vi mankas saĝeco, li petu Dion, kiu donacas al ĉiuj malavare kaj ne riproĉas."

Mi daŭrigis miajn ĉiutagajn okupojn ĝis la 21a de septembro de 1823 suferante dum la tuta tempo severan persekutadon de ĉiuj homklasoj, kaj religiaj, ĉar mi daŭre asertis, ke mi ricevis vizion.

Dum mia vizio, mi ricevis malpermeson aliĝi al iu ajn el la tiamaj religiaj sektoj. Ĝis la jaro 1823, mi restis fidela al la malpermeso. Tiuj, kiuj devis esti miaj amikoj, persekutadis min. Se ili kredis, ke mi estas viktimo de iu iluzio, ili devis klopodi fratece kaj amike malfermi miajn okulojn. Dum tiu periodo mi vidis min submetata al ĉiaj tentoj; kaj mi ofte stulte eraris kaj elmontris la malfortaĵojn de juneco kaj humaneco, ĉar mi estis ĉirkaŭata de ĉiuklasaj homoj. Mi bedaŭras diri, ke mi estis viktimo de diversaj tentoj, kiuj estis ofendemaj al Dio. Kvankam mi konfesas ĉi tion, neniu kulpigu min pro iaj grandaj aŭ seriozaj pekoj. Fari tion estis neniam en mia naturo.

Pro tio, mi ofte sentis min kondamnata pro miaj malfortaĵoj kaj neperfektaĵoj. En la nokto de la 21a de septembro, post mia enlitiĝo, mi komencis preĝi kaj petegis la ĉiopovan Dion pardoni ĉiujn miajn pekojn kaj malsaĝaĵojn kaj ankaŭ petegis de li manifestaĵon, por ke mi sciu, kia estas mia kondiĉo antaŭ Li, ĉar mi estis tute certa, ke mi ricevos ĉielan manifestaĵon kiel antaŭe.

Dum mi estis tiel preĝante al Dio, mi perceptis en mia ĉambro lumon, kiu pligrandiĝis ĝis la ĉambro fariĝis pli hela ol en tagmeza lumo, kaj subite aperis homfiguro flanke de mia lito, ŝvebanta, ĉar liaj piedoj ne tuŝis la plankon.

Li estis vestita en ellasita tuniko el la plej escepta blanko. Tia blanko superis ĉiun ajn teran aĵon, kion mi jam vidis; kaj mi eĉ ne kredas, ke iu ajn tera objekto povas esti tiel eksterordinare blanka kaj brila. Liaj manoj estis nudaj, kaj liaj brakoj ankaŭ estis nudaj ĝis iom super la manradikoj; ankaŭ liaj piedoj estis nudaj, kiel ankaŭ liaj kruroj iom super la maleoloj. Liaj kapo kaj gorĝo estis ankaŭ nudaj. Mi konstatis, ke li ne portis alian veston krom tiu tuniko ĉar mi povas vidi lian bruston.

Ne nur lia tuniko estis tre blanka, lia tuta aspekto estis pli glora ol iu ajn priskribo povas imagi. Kaj lia mieno estis kvazaŭ fulmo. La ĉambro estis tre hela, sed ne tiel luma kiel ĉirkaŭ li. Kiam mi ekvidis lin, mi ektimis, sed tuj mia timo malaperis.

Li alvokis min per mia nomo kaj diris, ke lin sendis Dio, kaj ke lia nomo estas Moroni; ke Dio havas taskon por mi, kaj ke mia nomo estos konsiderata de la homoj ĉu honorinda aŭ malhonorinda inter ĉiuj nacioj, triboj kaj lingvoj, kaj ke oni parolos pri ĝi bone aŭ malbone inter ĉiuj popoloj.

Li diris, ke ekzistas deponita libro, skribita sur oraj platoj, enhavanta la historion de la antikvaj loĝantoj de la amerika kontinento kaj ankaŭ de ilia origino. Li diris aldone, ke tiu libro enhavas la Eternan Evangelion, kiel ĝi estis donita de la Savinto Jesuo Kristo al la antikvaj popoloj. Ankaŭ li diris, ke ekzistas du ŝtonoj en arĝentaj framoj, kiuj fiksitaj al brustarmaĵo konsistigas tion, kion oni nomas Urimo kaj Tumimo. Kaj li diris ke ili estas deponitaj kun la oraj platoj, kaj ke la posedo kaj uzo de tiuj ŝtonoj inspiris la klarvidantojn de la antikvaj tempoj, kaj ke Dio ilin preparis por la tradukado de la libro.

Sciigante ĉi tion al mi, li citis kelkajn profetaĵojn el la Malnova Testamento. Unue li citis parton de la tria ĉapitro de Malaĥi, kaj ankaŭ la kvaran aŭ lastan ĉapitron de la sama profetaĵo, kvankam kun malgrandaj ŝanĝoj de la tekstoj ĝenerale legitaj en niaj Bibliojoj. Anstataŭ citi la unuan version kiel ĝi tekstas en niaj libroj, li ĝin citis jene: "Kaj jen, venos tago ardanta kiel forno; tiam ĉiuj arogantuloj kaj ĉiuj, kiuj faras malbonaĵojn kaj malvirtojn, brulkonsumiĝos kiel stoploj; ĉar mi ekbruligos ilin, diras la Sinjoro de la Homamasoj, tiel, ke ne restos el ili nek radiko nek branĉo.

Kaj li citis ankaŭ la kvinan version jene: "Mi revelacios al vi la Pastrecon per la mano de la profeto Elija, antaŭ al venos la granda kaj timinda tago de la Sinjoro."

Citis li ankaŭ la sekvantan version malsame: "Kaj li plantos en la korojn de la filoj, la promesojn faritajn al iliaj patroj, kaj la koroj de la filoj returniĝos al la patroj. Se ne estus tiel, la tuta tero estus detruita ĉe lia alveno."

Krom tiuj, li citis la 11-an ĉapitron de Jesaja, kaj diris, ke ĝiaj profetaĵoj baldaŭ plenumiĝos. Li menciis la trian ĉapitron de la Agoj de la Apostoloj, versoj 22 kaj 23, precize kiel ili estas en la Nova Testamento. Diris li, ke tiu profeto estas Kristo, sed ke ankoraŭ ne alvenis la tago kiam tiuj, kiuj ne aŭskultas tiun profeton ekstermiĝos el la popolo, sed ke tio baldaŭ venos.

Ankaŭ li citis la duan ĉapitron de Joel, de la verso 28a ĝis la lasta, kaj diris, ke tio ankoraŭ ne plenumiĝis sed baldaŭ estas plenumota. Kaj li diris plu, ke la prospero de la nacioj baldaŭ venos. Li citis multajn aliajn pecojn de la Sankta Skribo kaj faris multajn interpretaĵojn, kiuj ne povas esti ĉi tie menciitaj.

Ankoraŭfoje li diris, ke kiam mi havigos la platojn pri kiuj li parolis, ĉar ankoraŭ ne venis la tempo havigi ilin, mi montru ilin al neniuj, nek la brustarmaĵon kun Urimo kaj Tumimo, sed nur al tiuj, al kiuj Dio ordonos, mi estos detruita. Dum li parolis pri la platoj, vizio malfermiĝis en mia menso tiamaniere, ke mi povas vidi la lokon, kie esta deponitaj la platoj, tiel klare kaj nete, ke mi tuj rekonis la lokon kiam mi ĝin vizitis.

Post tiu sciigo, mi ekvidis, ke la lumo de la ĉambro komencis koncentriĝi ĉirkaŭ la homfiguro parolanta al mi ĝis la tuta ĉambro denove fariĝis malluma, escepte ĉirkaŭ li. Subite mi ekvidis vojon malfermiĝinta en la ĉielon per kiu li supreniris ĝis li tute malaperis kaj la ĉambro iĝis kiel antaŭ la apero de tiu ĉiela lumo.

Mi meditis pri la unikeco de tiu sceno, treege ravita de tio, kion mi aŭdis de tiu nekutima ĉiela anoncanto. Subite, meze de mia meditado, mi ekvidis, ke mia ĉambro ree eklumiĝas kaj kiel antaŭe la sama anoncanto reaparis ĉe mia lito.

Li komencis denove rakonti la samon, kion li jam rakontis dum sia unua vizito, sen iu ŝanĝo. Post tio, li informis min pri la teruraj punoj, okazontaj al la tero, kun afliktegoj kaŭzitaĵoj de malsato, militoj kaj pestoj; kaj li diris ankaŭ, ke tiuj dolorigaj penoj plenumiĝos sur la tero en ĉi tiu generacio. Rakontinte ĉi tion li ree supreniris.

Ĉi-foje, tiom profundaj estis la impresoj lasitaj en mian menson ke la dormemo forflugis el miaj okuloj, kaj mi kuŝis venkita de la mirego pri tio, kion mi vidis kaj aŭdis. Sed grandega estis mia surprizo, kiam denove mi vidis la ĉielan anoncanton apud mia lito kaj aŭdis lin rememorigi min kaj ripeti la samajn vortojn kiel antaŭe; kaj li aldone avertis, ke Satano, profitante la situacion de malriĉeco de mia familio, provos tenti min havigi la platojn celante riĉiĝi. Tion li malpermesis kaj konsilis min ne havi alian celon rilate al al akiro de la platoj krom gloro al Dio, kaj ke mi ne estu influata de iu ajn motivo krom la konstruo de Lia Regno. Alimaniere, mi ne povus ilin akiri.

Post tiu tria vizito, denove li supreniris en la ĉielon kiel antaŭe, kaj alian fojon mi restis meditante pri la strangeco de ĉio ĵus okazinta al mi, kiam, preskaŭ tuj post la tria reascendo de la ĉiela anoncanto en la ĉielon, la koko kokerikis, kaj mi vidis, ke la tago alproksimiĝas. Tial mi trovis, ke miaj interparoloj kun la anĝelo daŭris la tutan nokton.

Iom poste, mi ellitiĝis kaj, kiel kutime, iris al la necesaj laboroj de la tago; sed kiam mi eklaboris laŭ mia kutimo, mi rimarkis ke mia forteco estas tiom elĉerpita, ke mi sentis min nelaborkapabla. Mia patro, kiu laboris kun mi, vidis, ke io okazis kun mi kaj diris, ke mi iru hejmen. Mi foriris kun tiu intenco, sed dum la trapaso de la barilo de la bieno, kie ni loĝis, miaj fortoj forlasis min kaj mi falis surteren kaj kuŝis dum iom da tempo senkonscia.

La unua afero post mia rekonsciiĝo estis voĉo, vokanta min per mia nomo. Mi supren rigardis kaj vidis la saman ĉielan anoncanton ŝvebanta super mia kapo kaj ĉirkaŭata de lumo, kiel antaŭe. Li ripetis ĉion, kion li rakontis la pasintan nokton kaj ordonis, ke mi iru kaj rakontu al mia patro pri la vizio kaj pri la ordonoj, kiujn mi ricevis.

Mi obeis. Mi revenis al mia patro, kiu estis en la kamparo kaj rakontis al li ĉion, kio okazis. Li respondis, ke ĝi estis de Dio, kaj diris al mi agi laŭ la ordonoj de la anoncanto. Mi forlasis la bienon kaj iris al la loko, kie, laŭ la anoncanto estis deponitaj la oraj platoj. Danke al la klareco de la vizio, mi rekonis ĝin tuj, alveninte tien.

Proksime de la urba Manchester, en la provinco Ontario, ŝtato Novjorko, staras la plej alta monto de tiu regiono. En la okcidenta flanko de la monto, ne tre malproksime de la supro, sub granda ŝtono, kuŝis la oraj platoj en ŝtonkesto. En la mezo de ĝia supra parto, la ŝtono estis dika, kaj ronda en la mezo, sed maldika ĉe la randoj, tiel la centra parto estis videbla super la tersufaco, sed la randoj estis kovritaj de tero.

Foriginte la teron, mi metis levilon sub la ŝtonon kaj post malgranda klopodo sukcesis ĝin levi. Mi enrigardis kaj vere, mi ja vidis la orajn platojn, la Urimon kaj Tumimon kaj la brustarmaĵon, same kiel diris la ĉiela anoncanto. La kesto, kie ili kuŝis, konsistis el ŝtonoj, ligitaj per speco de cemento. En la fundo de la kesto estis du ŝtonoj transverse metitaj, sur kiuj kuŝis la oraj platoj kaj kun ili la aliaj objektoj.

Mi provis eltiri ilin, sed tion la aperinta anoncanto malpermesis, dirante, ke la tempo por eltiri ilin ankoraŭ ne venis, nek venos ĝis kvar jaroj post tiu dato. Sed li ordonis, ke mi revenu al tiu loko precize post unu jaro por renkontiĝi kun li, kaj ke mi ripetu tian viziton ĉiujare ĝis la tempo venos por havigi la orajn platojn.

Laŭ tiu ordono, mi revenis tien je la fino de ĉiu jaro kaj ĉiufoje mi renkontiĝis kun la sama mesaĝportanto. En ĉiuj niaj intervidiĝoj mi ricevis de li instrukciojn kaj informojn pri tio kion la Sinjoro estas faronta, kaj pri la maniero laŭ kiu Lia Regno estos kondukita al la tero en la lastaj tagoj.

Ĉar la ekonomiaj vivkondiĉoj de mia patro estis tre steĉaj, ni estis devigataj labori per niaj manoj, dungitaj laŭŝance. Iufoje ni estis hejme, aliffoje fore, kaj laborante senĉese, ni sukcesis vivi en relativa komforto.

En Oktobro 1825, mi iĝis dungito de maljuna S-ro Josiah Stoal, kiu loĝis en la provinco Shenango, ŝtato Novjorko. Dum mia laboro ĉe li, mi gastigis ĉe S-ro Isaac Hale, de Harmoni, Suskehana, ŝtato Pennsylvania. Estis tie, kie mi ekkonis mian estonan edzinon (lian filinon), Emma Hale. La 18-an de januaro de 1826, ni geedziĝis dum mi estis ankoraŭ dungito de S-ro Stoal. Tuj post ni geedziĝo, mi forlasis la dungon de S-ro Stoal kaj iris al la hejmo de mia patro kaj laboris kun li en la kampoj dum tiu sezono.

Finfine alvenis la tempo elpreni la orajn platojn, la Urimon kaj Tumimon kaj la brustarmaĵon. La 22-an de septembro de 1827, mi iris laŭkutime al la loko, kie ili estis deponitaj. La sama ĉiela mesaĝanto donis ilin al mi kaj admonis min, ke mi estos respondeca pri ili kaj, se mi permesos ilin malaperi pro malzorgo aŭ neglekto, mi estos detruita; sed se mi utiligos ĉiujn miajn eblecojn por protekti ilin ĝis li postulos ilian redonon, ili estos gardataj.

Baldaŭ mi komprenis, kial mi ricevis tiom striktajn ordonojn por gardi ilin sekurege, kaj kial la ĉiela anoncanto diris, ke li revenos por ricevi ilin denove kiam mi estos farinta tion, kion li ordonis. Nu, tuj kiam oni eksciis, ke mi posedas la orajn platojn, oni faris la plej fortajn klopodojn por forŝteli ilin. Oni uzis ĉiujn artifikojn por atingi tiun celon. La persekutado fariĝis pli kaj pli amara kaj severa. Amase oni atente atendis por forŝteli ilin de mi. Sed,

dank' al la saĝeco de Dio, la platoj restis en miaj manoj, ĝis mi plenumis tion, kion oni postulis de mi. Kiam la ĉiela anoncanto petis ilin, mi transdonis al li, kaj estas li, kiu ilin posedas ĝis ĉi tiu tago, kiu estas la 2-an de majo, 1838.

La agitado daŭris tamen, kaj la murmurado kun siaj mil langoj estis uzata la tutan tempon por cirkuligi kalumniojn kontraŭ mia familio kaj kontraŭ mi. Se mi eĉ rakontus parton de ili, tio plenumus volumojn. La persekutado fariĝis tiom netolerebla, ke mi estis devigata foriri el Manchester kaj kun mia edzino transloĝiĝi al la provinco Suskehana, en la ŝtato Pennsylvania. Ni estis tre malriĉaj kaj la persekutado estis tiel akra, ke ŝajnis al ni tute neebla havigi iom da mono por nia vojaĝo. Dume, ni pretiĝis por foriri, meze de niaj afliktoj, ni ekkonis novan amikon, Martin Harris, kiu nin vizitis kaj donacis kvindek dolarojn por helpi nin survoje. S-ro Harris loĝis en la distriko Palmira, provinco Wayne, ŝtato Novjorko, kaj estis bienulo de bonega reputacio. Dank' al lia oportuna helpo, ni povis alveni al nia celloko en Pennsylvania, kaj tuj post nia alveno mi kopiis la signojn de la oraj platoj. Mi kopiis grandan kvanton da ili, kaj pere de la Urimo kaj Tumimo, tradukis kelkajn el ili. Mi faris tion dum la tempo de mia alveno al mia bogepatra domo, en decembro ĝis la venonta februaro.

En la sama monato, la jam menciita S-ro Harris venis al mi, prenis la skribaĵojn, kiujn mi estis kopiinta el la oraj platoj, kaj ekveturis kun ili al Novjorka Urbo. La jeno estas la propra rakonto de Martin Harris, kiun li donis al mi pri la travivaĵoj de sia vojaĝo.

"Mi vojaĝis al Novjorko kaj montris la skribaĵojn kaj ilian tradukon al Profesoro Charles Anthon, fama pro siaj eruditaj verkoj. Profesoro Anthon deklaris, ke la traduko, farita el la antikva egipta lingvo, estas korekta multe pli ol iu ajn, kiun li ĝis nun vidis. Tiam mi montris al li la skribaĵojn ankoraŭ ne tradukitajn kaj li diris, ke ili estas el la lingvoj egipta, kaldea, asiria kaj araba. Kaj ke ili estas aŭtentikaj skribaĵoj. Pri tio, li transdonis al mi subskribitan ateston, kiun mi metis en mian poŝon; sed kiam mi estis forironta el lia hejmo, Profesoro Anthon alvokis min subite kaj demandis, kiamaniere la junulo eksciis, ke la oraj platoj estis en la loko, kie li trovis ilin. Mi respondis, ke anĝelo malkaŝis tion al li.

Tiam, Profesoro Anthon diris: "Lasu min revidi mian ateston!" Mi elpoŝigis ĝin kaj ĝin redonis al li. Tuj, li ĝin disŝiris, dirante, ke nun ne plu ekzistas anĝeloj, kaj konsilis min alporti la platojn al li por ke li traduku iliajn skribaĵojn. Mi informis lin, ke parto de la platoj estas sigelita kaj ke estas malpermesite forporti ilin. Li ekkriis, "Mi ne povas legi sigelitan libron!" Foririnte de tie, mi vizitis D-ron Mitchell, kiu konfirmis ĉion, kion Profesoro Anthon diris rilate al la surskribaĵoj kaj traduko."

La 5-an de aprilo 1829, Olivero Kaŭderi, kiun mi neniam antaŭe vidis, venis al mia hejmo. Li diris, ke li estas instruisto en la lernejo proksime de la hejmo de mia patro, kaj ĉar mia patro sendis siajn gefilojn al tiu lernejo, li gastis dum kelke da tempo en la domo de mia patro. Dum li estis tie, mia familio rakontis al li pri la cirkonstancoj en kiuj mi ricevis la platojn. Sekve, li decidis veni kaj demandi pri tio.

Du tagojn post la alveno de S-ro Kaŭderi, (la 7-an de aprilo) mi komencis traduki la Libron de Mormon kaj li komencis manskribi.

Ni daŭrigis ankoraŭ la tradukon, kiam dum la sekvanta monato (majo 1829) foje ni iris al arbaro por preĝi kaj konsulti kun la Sinjoro, pri bapto pri pardono de pekoj, kiel menciite en la traduko de la platoj. Dum ni preĝis kaj petegis al la Sinjoro, ĉiela anoncanto descendis el la ĉielo en lumnubo kaj metante siajn manojn sur nin, ordinis nin dirante: "Al vi, miaj kunservantoj, en la nomo de la Mesio, mi transdonas la Pastrecon de Aaron, kiu enhavas la ŝlosilojn de la ministrado de anĝeloj, de la Evangelio de pento, kaj de bapto por enakvigo por ricevi la pardonon pri pekoj. Ĝi estos neniam plu forpreninta de la tero ĝis kiam la filoj de Levi oferos denove sanktan oferon al la Eternulo."

Li diris, ke ĉi tiu Aarona Pastreco ne enhavas la povon por surmeti la manojn por ricevigi la Sanktan Spiriton, sed ke tiu povo estos donita al ni poste; kaj ordonis, ke ni baptu unu la alian. Li donis instrukciojn, ke mi unue baptu Oliveron kaj poste mi estu baptita de li.

Ni iris kaj baptis unu la alian laŭ la instrukcioj. Mi unue lin baptis kaj poste li baptis min. Post tio, mi surmetis miajn manojn sur lian kapon kaj ordinis lin al la Aarona Pastreco kaj poste li surmetis siajn manojn sur mian kapon kaj ordinis min al la sama pastreco, laŭ la ricevita ordono.

La mesaĝanto, kiu nin vizitis en tiu okazo kaj ordinis nin al ĉi tiu Pastreco diris, ke sia nomo estas Johano, la sama, kiu baptis laŭ la historio de la Nova Testamento. Li diris, ke li agas sub la gvido de Petro, Jakobo kaj Jojano, kiuj posedas la ŝlosilojn de la Melkicedeka Pastreco kiu, li deklaris, estos donita al ni je la ĝusta tempo, kaj ke mi estos nomita la unua eldoro de la Eklezio kaj li, Olivero Kaŭderi, la dua eldoro. Okazis tio ĉi la 15-an de majo 1829, kiam ni estis konsektritaj kaj baptitaj per la manoj de la ĉiela mesaĝanto.

Post nia bapto, ni spertis grandajn kaj glorajn benojn de nia Ĉiela Patro. Tuj post la elveno el la akvo, kiam mi baptis Oliveron Kaŭderi, la Sankta Spirito descendis sur lin, kaj li ekstaris kaj profetis multajn okazontajn eventojn. Kaj same, kiam mi estis baptita de Olivero, mi ankaŭ ricevis la spiriton de profetado kaj mi profetis pri la starigo de ĉi tiu Eklezio, kaj pri multaj aliaj aferoj, rilate al la Eklezio kaj al ĉi tiu generacio de la gefiloj de la homoj. Ni estis plenaj je la Sankta Spirito kaj ni ĝojis je Dio, nia Savinto.

Niaj mensoj tiuokaze estis lumigitaj, kaj la Sanktaj Skriboj ekklariĝis. Kaj ni komencis kompreni la sencojn de la pli malkaraj pecoj, kiujn ni nek povis kompreni antaŭ nek anticipis ilin kompreni. Tiam, ni devis gardi la sekreton pri la cirkonstancoj en kiuj ni ricevis la Pastrecon kaj estis baptitaj, pro la spirito de persekutado, kiu jam manifestiĝis meze de najbaroj.

De tempo al tempo eĉ religiuloj minacis linĉi min. Tia minaco estis nur kontraŭita de la influo de la familio de mia bopatro, kiu per dia providenco, tre amikiĝis al mi kaj kiu kontraŭstaris la popolaĉon, ĉar li volis, ke mi estu lasita daŭrigi la traduklaboron

seninterrompe. Do li proponis kaj promesis protekti min laŭeble kontraŭ ĉiuj nelaŭlegaj entreprenoj.

Dum la tradukado, ni eksciis, ke la Sinjoro indikos tri specialajn atestantojn, al kiujn li permesos vidi la platojn, el kiuj la Libro de Mormon estis tradukata; kaj ke tiuj atestantoj devos fari skriban ateston pri la Libro de Mormon, kiel estas antaŭdirite en la Libro de Mormon, Eter 5:2-4 kaj 2 Nifai 27:12. Preskaŭ tuj post kiam ni eltrovis ĉi tion, venis al la mensoj de Olivero Kaŭderi, David Whitmer kaj Martin Harris la ideo, ke mi petu la Sinjoron, ĉu ili povus akiri de Li la privilegion esti la tri specialaj atestantoj. (La peto farita estis al la Sinjoro kaj la respondo estis, ke ili estu la atestantoj.)

Kelkajn tagojn poste, Martin Harris, David Whitmer, Olivero Kaŭderi kaj mi decidis iri denove en arbaron kaj tie provi, per humila preĝo la plenumon de la promeso havigi, ke ili vidu la platojn. Ni elektis lokon en la arbaro proksime de la domo de S-ro Whitmer. Ni iris tien, surgenuiĝis kaj komencis preĝi kun granda fido al la Ĉiopotenca Dio, ke li plenumu Sian promeson.

Laŭ nia interkonsento, mi komencis preĝi laŭvoĉe al nia Ĉiela Patro, kaj same min sekvis miaj kunuloj. Ni ne sukcesis tamen, atingi iajn ajn rezulton per nia unua provo. Ni sekvis poste la saman ordon en la preĝoj, ĉiu el ni alvokante kaj preĝante kun fervoro al Dio, sed kun la sama negative rezulto.

Post nia dua malsukceso, Martin Harris diris, ke li devis forlasi nin, ĉar li opiniis, ke li estas netaŭga, kaj pro tio la Sinjoro ne respondas niajn preĝojn. Li tiam nin forlasis. Ni surgenuiĝis denove. Baldaŭ poste ni estis preĝintaj dum kelkaj minutoj, ni ekvidis lumon ŝvebanta super ni en la aero, eksterordinare brilega, kaj jen, ni vidis anĝelon antaŭ ni. Liaj manoj tenis la platojn. Li foliumis la platojn unu post la alia, tiel ni povis bone rigardi ilin kaj distingi iliajn surskribojn. Tiam li turnis sin al David Whitmer kaj diris: "David, laŭdataj estu la Eternulo kaj tiuj, kiuj obeas Liajn ordonojn." Ni aŭdis tuj poste, voĉon venintan el la lumo brilanta super ni, kiu diris: "Ĉi tiuj platoj estis revelaciitaj per la potenco de Dio. Ilia traduko, kion vi vidis estas korekta kaj mi ordonas, ke vi atestu pri tio, kion vi nun vidas kaj aŭdas."

Mi foriris de David kaj Olivero kaj serĉis Martin Harris, kiun mi trovis malproksime, preĝanta fervore. Li diris, ke li ankoraŭ ne ricevis pardonon de la Sinjoro kaj min petis, ke ni kune preĝu, por ke li ricevu la samajn benojn, kiujn ni ricevis. Ni unuiĝis en preĝo kaj finfine akiris tion, kion ni deziras. Ĉe la fino de nia preĝo, la sama vizio malfermiĝis antaŭ niaj okuloj kaj mi vidis ree la samajn aĵojn. En tiu momento, Martin harris ekkriis ekstaze: "Sufiĉas, sufiĉas, miaj okuloj jam vidas!" kaj eksaltante li ekkriis, "Hosana," glorante Dion.

Nun, post kiam Dio komplete donis tiajn glorajn manifestaĵojn, por la tri atestantoj restis obei la ordonon ricevitajn; t.e. atesti pri tiuj aferoj. Por tion fari, ili verkis kaj subskribis la sekvantan ateston.

Eksciu ĉiuj nacioj, familioj, lingvoj kaj popoloj, kiujn ĉi tiu dokumento atingos; ke ni, dank' al la graco de Dio la Patro, kaj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, vidis la platojn, kiuj enhavas la raporton, kiu estas la raporto pri la popolo de Nifais kaj ankaŭ de la Lamanidoj, iliaj fratoj, kaj ankaŭ ĉe la popolo de Jaredo, kiu venis el al Turo, kiu estas menciita. Ni scias ankaŭ, ke ili estas tradukitaj per la graco de Dio, kiel Li deklaris per Sia voĉo; ni scias do, sendube, ke tiu ĉi traduko estas vera. Ni aldone atestas, ke ni vidis la surskribojn de la platoj, kaj ke ili estis montrataj al ni per la potenco de Dio kaj ne de la homoj. Ni deklaras solene, ke anĝelo de Dio, veninta el la ĉielo, alportis kaj montris al ni la platojn, kies surskribojn ni vidis. Ni scias, ke estas per la graco de Dio la Patro, kaj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke ni vidis tion kaj atestas, ke tiuj ĉi aferoj estas veraj. Tio ĉi por ni estas mirinda. Kaj la voĉo de la Sinjoro ordonis, ke ni atestu tion ĉi; pro tio, ni obeante la ordonojn de Dio faras tiun ĉi ateston. Kaj ni scias plie, ke se ni restos fidelaj al Kristo, ni ne estos kulpaj pro la pekoj de la homoj, kaj ni montros nin senmakulaj antaŭ la tribunalo de Kristo; kaj loĝos eterne kun Li en la ĉielo. Kaj honoro estu al la Patro, al lia Filo kaj al la Sankta Spirito, kiuj estas unu Dio. Amen."

Olivero Kaŭderi
David Whitmer
Martin Harris

Baldaŭ post ĉi tiuj okazintaĵoj, estis ricevita la jena kroma atesto.

Eksciu ĉiuj nacioj, familioj, lingvoj kaj popoloj, kiuj ricevos ĉi tiun libron; ke Jozefo Smith filo, tradukinto de tiu ĉi libro, montris al ni la platojn menciitajn, ŝajne de oro, kaj ni tuŝis per niaj manoj ĉiun platon, kiun tradukis Jozefo Smith. Kaj ni ankaŭ vidis la surskribadojn de la platoj. La platoj aspektis antikvaj kaj kurioze prilaboritaj.

Kaj ni solene ĵuras, ke Smith montris al ni la platojn, ĉar ni vidis kaj tuŝis ilin. Kaj ni sendube scias, ke Smith posedas la platojn al kiuj ni aludas. Kaj ni donas niajn nomojn al la mondo por atesti pri tio, kion ni vidis.

Kaj Dio atestas, ke ni ne mensogas.

Christian Whitmer	Hiram Page
Jozefo Smith, patro	Jakob Whitmer
Peter Whitmer, filo	Hiram Smith
Samuel H. Smith	Johano Whitmer

Ni sopiris vidi la plenumon de la promeso farita de la anĝelo, kiu al ni donis la Aaronan Pastrocon. La promeso estis, ke se ni estas fidelaj, ni ankoraŭ ricevos la Melkicedekan Pastrocon, kiu enhavas la aŭtoritaton de la surmetado de manoj por ricevigi la donacon de la Sankta Spirito. (La profeto deklaris, ke la Melkicedeka Pastreco estis ricevita sub la manoj de Petro, Jakobo kaj Johano sur la bordoj de la Suskehana rivero, inter Harmoni en la provinco Suskehana, ŝtato Pennsylvania kaj Colesville, en la provinco Broome, ŝtato Novjorko.)

Dum la Libro de Mormon estis en la manoj de la presisto, ni daŭre atestis kaj donis informojn kiel eble plej ofte. Ni ankaŭ sciigis niajn fratojn, ke ni ricevis ordonon organizi la Eklezio. Kun tiu intenco, ni kunvenis en la domo de S-ro Peter Whitmer (ses personoj partoprenis) la 6-an de aprilo 1830. Malferminte la kunvenon per solena preĝo al nia Ĉiela Patro, ni demandis niajn fratojn ĉu ili akceptis nin kiel siajn instruistojn rilate al la aferoj de la Regno de Dio, kaj ĉu ili estas konsentaj daŭrigi la organizadon de la Eklezio laŭ la ordono, kiun ni ricevis. Al tiuj ĉi proponoj ili konsentis unuanime. Tiam mi metis miajn manojn sur la kapon de Olivero Kaŭderi kaj ordinis lin eldoro en la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Post tio, li ordinis min ankaŭ al la ofico de eldoro de la menciita Eklezio. Tiam, mi prenis panon, ĝin benis kaj disdonis ĝin. Ankaŭ ni benis iom da vino kaj ĝin kune trinkis. Poste, mi metis la manojn sur ĉiun ceteran membron de la Eklezio, por ke ĉiuj ricevu la donacon de la Sankta Spirito kaj estu konfirmitaj membroj de la Eklezio de Kristo. La Sankta Spirito ĉirkaŭis nin grandmaniere. Iuj profetis, dum ĉiuj ni laŭdis la Eternulon kaj treege ĝojis.

Post tio, ni alvokis kaj ordinis kelkajn fratojn al la diversaj oficoj de la Pastreco, laŭ la manifestaĵoj de la Sankta Spirito. Kaj post tia ĝojiga tempo, dum kiu ni sentis kaj atestis unuope la potencon kaj benojn de la Sankta Spirito, per la graco, kun Dio donis al ni, ni adiaŭis kun la agrabla scio ke ni estas individuaj anoj, agnoskitaj de la Eklezio de Jesuo Kristo, organizita laŭ la instrukcioj kaj revelacioj, kiujn Li donis al ni en ĉi tiuj lastaj tagoj, kaj ankaŭ laŭ la modelo de la Eklezio, kiel ĝi estas priskribita de la Nova Testamento.

Ĉi tio estas la simpla kaj rekta atesto de Jozefo Smith, kiu pritraktas kelkajn okazintaĵojn, kiuj kondukis al la establo de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.

Post la establo de la Eklezio, Jozefo Smith kaj liaj sekvantoj transloĝiĝis el Novjorko al Kirtkand, ŝtato Ohio, proksime de Cleveland. Tie ili konstruis belan templon, organizis ampleksan misian agadon kaj multe da personoj aliĝis al la Eklezio. Inter la misioj organizitaj en tiu regiono estis unu en Missouri, kaj poste la plejmulto de la membroj transloĝiĝis tien.

Estis tiam epoko de religia maltoleremo kaj tuj eksplodis antagonismo kontraŭ la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Ili estis atakataj de pluraj popolaĉoj kaj sekve estis devigataj ree transloĝiĝi, forlasante siajn hejmojn, bone kulturitajn kampojn kaj preĝejojn.

Ili iris tiam al Illinois, kie ili estis en sia malĝojo bonkore akceptitaj. En soleca loko ĉe la rivero Mississippi, ili aĉetis marĉan terenon. Ili ĝin drenis kaj tie konstruis urbon kiu fariĝis la plej granda en Illinois; Naŭvoo, "la Bela." La misiaj klopodoj en Ameriko kaj Anglujo ege pligrandigis la kvanton da membroj kaj ili prosperis dum kelka tempo.

Sed la paco en Naŭvoo daŭris mallonge. Refoje, amara religia netoleremo enkondukis la

persekutadon. Jozefo Smith kaj lia frato estis malliberigitaj pro la falsaj akuzoj en Carthage, Illinois. Tie, dum ili atendis juĝon, kaj sub garantiita protekto de la ŝtato, armita popolaĉo kun farbitaj vizaĝoj murdis ilin per kugloj la 27-an de junio, 1844.

Brigham Young estis la posteulo de Jozefo Smith en la estrado de la Eklezio. Sub lia gvidado, la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj forlasis la ŝtaton Illinois kaj faris sian longan historian migradon al la Rokaj Montoj. Tie, dank' al iliaj strebado kaj fido, ili nun fariĝis potenca popolo.

Jozefo Smith estas nuntempe akceptata kiel profeto de Dio de milionoj da personoj en centoj da landoj. La virtoj kaj atingoj de tiuj, kiuj akceptas lian ateston staras kiel monumento al lia dia alvoko. La Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj havas sian fundamenton en la revelacioj, kiujn li ricevis kaj en la aŭtoritato de la Pastreco de la restarigito.